

La Espero

1973-4

Svenska Esperantotidningen

Fondita en 1913

Ni kongresis en

KALMAR



Kalmar, urbo konstruita apud grava fortikaĵo proksime al la iama landlimo inter Svedujo kaj Danlando, estis precipe dum la Mezepoko la scenejo de pluraj eventoj, kiuj decide influis la historion de la respektivaj landoj. Ekzemple en 1397, reprezentantoj de la tri skandinavaj landoj kolektiĝis tie kaj, je iniciato de la reganto, reĝino Margareto, oficialigis politikan kaj ekonomian unuigon inter Danlando-Svedujo-Norvegio. La Kalmar-unuiĝo, pri kiu ni lernis en la lernejo, disfalis du-tri jardekojn pli malfrue, je la morto de reĝino Margareto, kiu evidente estis forta personeco ĉar ĝis niaj tagoj la politikistoj vane provis revivigi similan unuiĝon inter la nordaj landoj.

Dum pentekosto 1973 okazis la jarkongreso de la Sveda Esperanto-Federacio en tiu historia urbo, sed oni ne povas aserti, ke ĝi estis karakterizita de speciala nordlanda kunlaboro. Neniu gasto el la aliaj nordaj landoj ĉeestis kaj oni ne plu diskutis pri komuna nordlanda gazeto: en Västerås ja montriĝis pasintjare, ke kiam la svedoj finfine komencis interesiĝi pri tiu ideo ne plu restis intereso en la aliaj nordaj landoj.

La jarkongreso de Kalmar apartenas eble al la plej trankvilaj en la historio de SEF. Ne okazis multe da viglaj diskutoj. La jarkunsido, kiun lerte, rutine kaj bonhumore gvidis Curt Alv, Norrköping, tiel rapide pritraktis la diversajn punktojn de la tagordo, ke ĝi finiĝis tutan horon antaŭ la lunĉopaŭzo. La estraranoj reelektiĝis, kaj ŝanĝoj okazis nur pri la revizoroj (novaj: Sonja Morariu, Solveig Edvardsson).

Inter la reelektitoj troviĝas Jan Strönne, kaj oni atentigis ke pasis dudek kvin jaroj de kiam li postsekvis Ernfrid Malmgren kiel prezidanto de SEF. Sven Alexandersson, nuntempe kasisto, dankis persone al Jan Strönne pro dudek kvin-jara, intima kaj inspiriga kunlaboro kun "tiu mirakla homo, kies laborkapablo ŝajnas neelĉerpebla" kaj en la nomo de la tuta sveda movado pro lia sindona agado. La ĉeestantoj substrekis la dankon per forta aplaŭdo.

Du mocioj estis pritraktataj. La nova vigla Agadgrupo por Esperanto en Västerås aludis al la multaj bonaj ideoj kaj sugestoj pri la agado kiuj aperas en Klippinfo, Mondo kaj si-

milaj eldonajoj sed neniam en La Espero aŭ Revuo Esperanto kaj proponis almenaŭ multobligitan aldonon kun simila enhavo al la gazetoj. La jarkunsido decidis transdoni la proponon al la redaktoroj de la respektivaj revuoj kun rekomendo ke ili atentu pri la vidpunktoj.

La jarkunsido estis same kiel la estraro iom skeptika al la mocio de Thorsten Farm kun apogo de la Amika Rondo en Sundsvall pri intervjuoj kun la gvidantoj de la politikaj partioj en Svedujo por igi ilin deklari, antaŭ la gravaj ĝeneralaj elektoj en la aŭtuno, kiel ili rigardas la mondan lingvoproblemon kaj esperanton. Oni ne kredis je pozitiva efiko de tiaj demandoj al la partiestroj ĝuste nun kaj anstataŭ decidis transdoni la mocion al la respondeculo pri la parlamenta kampanjo en Svedujo.

Se tiu ĉi raporto ŝajnas al vi iom "pala" kaj donas la impreson, ke la jarkongreso en Kalmar estis sufiĉe sensignifa kaj inerta, vi tamen ekhavis falsan bildon. Tute male: ŝajnas al mi, ke SEF nun eniris periodon de vigla agado kiu devas havi pozitivajn efikojn, kaj povas esti, ke la jarkongreso en Kalmar okazis en momento, kiu estos same grava por la historio de la esperanto-movado en Svedujo kiel estis siatempe la kunveno de la Kalmar-unuiĝo por la ĝenerala historio.

Por tion kompreni, oni devas rigardi ne nur la jarkongreson sed la tutan agadon de SEF. Ŝajnas ke ni havas ĝuste nun aparte efektivan estraron, en kiu ekzistas bona bilanco inter malnovaj spertaj "fortuloj", kiuj garantias kontinuecon kaj solidecon, kaj same fortaj junaj voloj, kiuj reprezentas novajn modernajn ideojn, kiuj ja ankaŭ necesas por la adaptiĝo de nia movado al ĉiam pli rapide ŝanĝiganta socio.

Jam la jarraporto de la estraro montris novaĵojn: ĝi estis multe pli ampleksa ol antaŭe (en La Espero aperis nur resumo) kaj provas doni bildon pri la agado de la tuta sveda esperantomovado, ne nur de SEF, kaj pri la agado de diversaj lokaj kluboj. La plibonigita informado al la kluboj (Klubinfo aperis kvinfoje dum 1972) estas alia atesto pri aktiveco, kaj ankoraŭ pli la agado dum tiu ĉi jaro: la lerneja kampanjo, la eldono de nova lernolibro, la fondiĝo de novaj kluboj ktp. Aldonu al tio la raportojn pri pluraj radioprogramoj pri esperanto, tre pozitivaj al ni, kiuj eble montras novajn vojojn por konkeri la svedan radion kaj, ankoraŭ pli grave, la televidon.

Konforme al la nova aspekto de La Espero ni devas rompi la tradicion ankaŭ rilate al la raportado pri la jarkongreso kaj nur resume mencii kelkajn erojn:

La jarkunveno de Eldona Societo Esperanto estis plejparte dediĉita al diskutado pri la nova vortaro svedesperanta. La estraro de ESE favoras nun pli malmultekostan alternativon: presigon de aldone, suplemen-

to, kun novaj vortoj kaj reeldono de la malnova vortaro laŭ fototeknika represigo. Tute nova vortaro kostus tiel multe, ke ĝi ne estus vendebla. Tiun alternativon tamen forte kritikis pluraj ĉeestantoj, kiuj deziris, ke oni ankoraŭ esploru, ĉu tamen ne eblas presigi tute novan vortaron je akceptebla prezo, eventuale eksterlande.

La enkadrigo de la kunsidoj sekvis la tradicion de multaj jaroj. La prez. de LJK, Nils Kindgren, salutis la partoprenantojn je la solena malfermo, kaj por la muzika enkadrigo de tiu solenaĵo respondecis Roland Dupuis. La oficiala reprezentanto de la urbo, Helge Rigemar, v. prez. de la urba konsilantaro, parolis pli poste je la bankedo, kaj la vespero finiĝis per filmo pri la konstruado de la ponto inter Kalmar kaj Öland kaj dancado.

Je la distra vespero en la alia tago Roland Dupuis en mirinde belaj lingvo kaj muziko rakontis je kolorbildoj pri ruzvojaĝo en Francujo — kiel ni jam pasintjare konstatis liaj programoj estas tre altnivelaj kaj vere ĝuidaj — kaj Hans Lindén solkantis kaj kantis akompane kun du aliaj ĝejnuloj el la popolaltlernejo de Oskarshamn.

La urbo Kalmar regalis per aŭtobusa veturo tra la ĉarma urbo en la pentekosta tago, kaj pentekostan lundon okazis aŭtobusa ekskurso al Öland. En freŝa vento kaj klara sunbrilo ni transveturis Kalmarsund — la markolo — laŭ la plej longa ponto de Eŭropo kaj atingis al tiu mirinda insulo, kies plej fama vidaĵo estas la vastega kalka plataĵo Allvaret, la Seriozeco.

Ne abundas dancoj kaj laŭdoj en tiu ĉi artikolo. Sed estas ja konata fakto, ke se ĉio glate funkcias kaj neniu ĝenajoj aperas, tiam oni ne rimarkas la laboron de la respondecaj organizantoj — ilian signifon oni rimarkas nur kiam forestas tiu laboro. Certe multajn liberajn horojn, oferis LJK-anoj Kindgren, Wik, Johansson kaj aliaj, kies nomojn mi eĉ ne lernis. Alie ili ne estus povintaj doni al la jarkongreso 1973 tiel perfektan enkadrigon, alie ni ne tiel bone fartus kaj ĝuus la tagojn en Kalmar. Dankon, ĉiuj!

Kaj sekvontjare en Borlänge! Ankaŭ dum pentekosto. Vi havos malfacilan taskon, vi ĝeamikoj en Dalekarlio. Ni ne envias vin. Sed ni volonte venos al via bela kaj fama provinco!

obo

Redaktoro:

Pasis la somero 1973, eksterordinare bela kaj varma, kaj kun la alveno de la aŭtuno levigas denove la demando: ĉu ni provos aranĝi kurson por komencantoj aŭ ne?

Verdire: bone funkcia esperanto-klubo jam en la printempo jesis al tiu demando kaj faris tiam la preparojn. Pluraj svedaj kluboj bone funkcias, kaj certe ni havos dum tiu ĉi studsezono bonajn kursojn en pluraj lokoj.

Sed estas same certe, ke multaj kluboj ne havos kursojn por komencantoj, aŭ ĉar ili tute ne klopodis, aŭ ĉar ili tute ne klopodis, aŭ ĉar ili malgraŭ klopodoj ne ricevis adeptojn. Se la membroj de tiuj kluboj estas maljunaj, la klubo kompreneble post kelkaj jaroj ne plu ekzistos.

Mi estas funde optimisto, kaj pri la estonta venko de esperanto mi persone estas konvinkita. La ĝenerala situacio por esperanto hodiaŭ certe ne estas tiel malfavora, kiel imagas al si multaj homoj en niaj propraj vicoj. La mondlingva problemo ne estas solvita, la angla lingvo malgraŭ egaj financaj kaj politikaj apogoj ne sukcesis atingi tiun pozicion, kiun ni pretendas por esperanto: la dua lingvo de ĉiu homo, por ĉiuj internaciaj rilatoj. Kaj en vastaj rondoj oni sendube havas certan simpatian por esperanto.

Sed oni ne tial rajtas simple forpuŝi la problemon pri la kluboj, kies membroj maljunigas kaj kiuj ne plu ricevas freŝan sangon. Kion fari pri ili?

La anoj de tiuj kluboj ofte plendas, ke mankas la intereso por esperanto ĉe la homoj ĝenerale, ke ŝanĝiĝis la tempo. Tio estas eraro. La tempo certe ŝanĝiĝis, sed la problemoj ĝenerale estas persona. Oni ne plu sukcesas interesi homojn por nia lingvo, ĉar oni havas nek tempon nek energion. Oni fakte bezonus helpon de ekstere, de iu de ekstere alvenanta propagandisto/instruisto, ia sindiko.

Kaj la solvo? Nu, mi ne havas konkretan proponon, sed tiu estas unu el la problemoj diskutendaj kaj solvendaj. Provizore ni devas nur, ĉiu en sia loko, fari kion eblas. En ordinaraĵoj svedaj urbetoj eble ne ĉiam necesas kursoj en la vera senco de tiu vorto; oni povas instrui esperanton eĉ al unu aŭ du personoj. Eĉ nur unu nova esperantisto povas esti jam progreso.

Kial ne provi? Elektu inter la lernolibroj de la anonco ĉi-apude. Kaj memoru, se vi ricevos plurajn kursanojn, vi ricevos ŝtatan kontribuon se vi raportos la kurson al loka studorganizaĵo.

Bonan sukceson!

DU starta en kurs!

Det kanske är lättare än du tror! Du kan t. ex. intressera några av dina bekanta. Det finns mängder av bra hjälpmedel. Här några exempel:

ALLAS ANDRA SPRÅK

ESPERANTO (E. Malmgren) 9:40
Välkänd, lättanvänd, omväxlande och roande lärobok, speciellt gjord för kurser. Läraren kan helt följa läroboken.

★

ESPERANTOKURS

(F. Lindén) 10:60
Mera omfattande lärobok med utförliga grammatiska förklaringar. Särskilt användbar i kurser, där deltagarna önskar ingående studier i Esperanto eller har tidigare språkundervisning. Denna lärobok kräver något mer förarbete av läraren.

★

ESPERANTO PER POST

Korrespondenskurs (10 brev) 15:—
Instruktiv, lättfattlig, intressant. Går utmärkt att använda som kursmaterial. Kursdeltagare sänder genom ledaren gemensamt in lösningarna till Esperantoförlagets rättare. Undervisande lärare krävs således ej för denna kurs. En kunnig kursledare kan naturligtvis även själv rätta lösningarna. Var god meddela vid beställningen hur kursen lägges upp.

★

INTERNACIA ELPAROLO

Uttalsskiva, med texthäfte 7:65
Modern 33-varvs grammofoonskiva, intalad av flera kända internationella röster. Bra hjälp i en nybörjarkurs för inlärandet av rätt uttal.

★

KORRESPONDERA MED HELA

VÄRLDEN (R. Pehrsson) ... 2:35
God hjälp och ledning för en nybörjare. Exempel på brevformulering från enkla hälsningar till mera avancerad skriftväxling.

SVENSK-ESPERANTISK PARLÖR

(R. Pehrsson) 1:20

SVENSK-ESPERANTISK ORDBOK

(S. O. Jansson, F. Lindén, E. Gerdman) häft. 21:20
Fullständig ordbok med många exempel.

ESPERANTO-SVENSK ORDBOK

(P. Nylén) 18:80

LILLA ORDBOKEN

(E. Vilborg) 14:10
Behändig och modern Svensk-Esp. Esp.-Svensk fickordbok.

★

EL LA VIVO DE L. ZAMENHOF

(G. Henriksson) 3:25
Dr Zamenhofs ungdom skildrad i enkla fraser just för nybörjare. En "obligatorisk" bok för alla kursdeltagare.

★

Vidare föreslår vi:

KORRESPONDENSANNONS förmedlas av Esperantoförlaget i internationell tidning (Heroldo) .. 10:50
Sådan annons kan sättas in redan en månad innan tidningen med annonsen kommer ut, kan kursdeltagare vid den tidpunkten mycket väl föra en enkel korrespondens, t. ex. per vykort. Detta stimulerar och ger bevis på Esperantos användbarhet.

Sådana annonser förmedlas givetvis även till andra internationella tidningar, t. ex. Revuo Esperanto. Priserna varierar därvid.

★

För övrigt bör kursledarna och lärarna stimulera elevernas intresse för egen läsning. Detta ger vana och gott ordförråd. Förslag till lätta läseböcker finns i UEA:s årsbok, boklistan. Vi skaffar allt som önskas.

FORTSÄTTNINGSKURSER

Delar av nybörjarkursen bör snabbrepeteras. Därefter kan man **noggrant** genomgå

SVENSK ESPERANTO GRAMMATIK (E. Carlén) 17:65

★

Dessutom bör en intressant bok läsas och diskuteras. Boken skall väljas efter kursdeltagarnas förkunskaper. Som första bok föreslår vi:

VIVO VOKAS

(S. Engholm) inb. 11:75
En originalroman om ungdom på utomordentlig Esperanto, lätt men perfekt språk. Den mest använda boken för fortsättningskurser.

★

LA GRANDA AVENTURO

(F. Szilágyi) .. häft. 8:80 inb. 11:75
Trevliga och underhållande noveller, orig. Esp.

★

NORMANDAJ RAKONTOJ

(G. de Maupassant) 25:90
Berättelser från Normandie, övers. R. Dupuis.

För mer Esperantokunniga. För övrigt kan alla Esperantoförlagets utgåvor rekommenderas för såväl gott språk som intressant innehåll. Boklista sändes gärna på begäran.

★

MOMS ÄR INRAKNAD I OVANSTÄENDE PRISER.

ESPERANTOFÖRLAGET

Fack 200 42 MALMÖ Postgiro 578-5

Sonnabend dimanĉe en Kalmar

En la unua pentekosta tago estis kolektitaj tie en Jerusalemo homoj el multaj diversaj nacioj, parolantaj diversajn lingvojn. Subite ili trovis, ke ili povis kompreni unu la alian, ke ili povis ĉiuj interparoli kaj laŭdi Dion kvazaŭ en unu komuna lingvo. Okazis miraklo.

Ni esperantistoj posedas komunan lingvon, sed ni ne povas atendi similan miraklon. Ne okazos, ke la homoj subite unu tagon parolas en esperanto sen lerni ĝin. Ni devas labori, batali, por igi la homojn lerni nian lingvon.

Tiel la gastpreleganto en Kalmar, lernejestro **Helmut Sonnabend**, Germanujo, enkondukis sian prelegon "Kial kaj kiel lingva eksperimento? La nuna stato en Eŭropo."

En la daŭro li demandis, ĉu ni konscias, kiel ege granda estas nia pretendo: Ke ĉiu homo en la tuta mondo lernu kaj uzu esperanton kiel sian duan lingvon. Nek la angloj nek la rusoj kuraĝas tion pretendi por siaj lingvoj. — Por apogi nian pretendon ni asertas, ke esperanto estas pli facile lernebla ol la naciaj lingvoj, ke ĝi bone funkcias en internaciaj rilatoj pro sia facileco, ktp. Tio estas faktoj bone konataj al ni mem — sed nur al ni, esperantistoj. Niaj asertoj ĝis nun ne estas science pruvitaj. Ni devas prui ilin!

Sciencaj pruvoj povas okazi nur per universitatoj aŭ altlernejoj. Preĉipe gravaj estas la pruvoj pri la instruebleco de esperanto. La preleganto konsideris konata la nunan eksperimenton en centra Eŭropo: partoprenas lernejoj en Italio-Aŭstrio-Jugoslavio-Hungario. Okazas samtempa instruado de esperanto al lernantoj en la sama aĝo kaj sama instrunivelo en kelkaj lernejoj de tiuj landoj, **regiono unu**. Regiono tri (regiono du estas jam okcidenta Eŭropo) povus esti la nordaj landoj inkluzive Finnlando kaj eventuale Pollando kaj Sovetio.

Kiel okazu la instruado? — Ĉiu ŝtato kiu partoprenas la eksperimenton fondu lernejan komisionon. Ĝi devas krei konstantan kontakton kun la superaj oficialaj organoj kompetentaj pri la enkonduko de esperanto en la lernejojn. Komuna konferenco proponu al la kompetentaj lernejoj instancojn enkonduki eksperimente devigan instruadon de esperanto en difinitan nombron da lernejoj. Estas konsilinde, ke la instruado komenciĝu

post du jaroj de la elementa lerneja studado kaj ke ĝi daŭru minimume tri jarojn.

Oni organizu laborgrupon el la fakaj reprezentantoj de la unuopaj lernejoj komisionoj. La taskoj de tiu laborgrupo estu: 1) prepari necesan bazan dokumentaron, t. e. instruprojekton, kompleksan didaktikan minimumon, instrumentodajn rekomendojn ktp, 2) fakte gvidi kaj sekvi la fluon de la eksperimento kaj raportoj pri la fakaj konkludoj de la eksperimento.

Ĉiu laborgrupo elektu respondecon pri la eksperimento. Lia tasko estu, konsente kun la oficialaj instancoj de lia lando elekti tiujn lernejojn, kie estas taŭgaj kondiĉoj por okazigi la eksperimenton, nome: organizi eksperimentan klason por deviga instruado de esperanto kaj, se eblas, paralelan kontrolan klason, en kiu oni instruas alian fremdan lingvon laŭ samaj kondiĉoj. Je la fino de la lerneja eksperimento estu aranĝita Internacia Lernejo sub aŭspicio kaj kontrolo de internacia komisiono konsistanta el ŝtataj komisiitoj, lingvistoj kaj politikaj reprezentantoj."

Post la prelego okazis gruplaboro kaj poste resumoj kaj komuna diskutado. Oni konstatis i. a. ke tia eksperimento en eventuala regiono tri ne estas tuj hodiaŭ efektivebla. Oni devas zorge prepari la grundon per detala antaŭlaboro. La planita lerneja kampanjo en Svedujo povas esti la unua paŝo ĝuste por prepari la grundon.

La perspektivoj, kiujn prezentas la prelego de s-ro Sonnabend, estas ege vastaj. Ĝi ankaŭ rilatas al la vera

kerno de niaj problemoj kaj nia agado. Nur per deviga instruado de esperanto en la lernejoj nia fincelo estas atingebla. Por nefakulo tamen estas tre malfacile resumi tian prelegon, preĉipe kiam temas pri teknikaj detalaĵoj. Tial mi esperas ke mia redaktora kolego Oskar Svantesson, eldonanto de **Mundo** kaj iama redaktoro de La Espero, fakulo pri lernejoj aferoj, pardonos, ke grandajn partojn de la ĉi-supra resumo mi ĉerpis el lia artikolo en **Mundo**.

obo

VIZITONTE AUSTRALION?

La esperantistoj en Perth — "unu el la plej izolitaj urboj de la mondo" — deziras renkonti esperantistojn el aliaj landoj por havi okazon interparoli en esperanto kun eksterlandanoj. Esperantistaj maristoj aŭ aliaj vojaĝantoj kiuj trapasos la ŝiphavenon Fremantle bv helpi tiujn entuziasmajn sed izolitajn gesamideanojn. Se eble, informu skribe pri via vizito al Esperanto League of W. A., P. O. Box 53, Nedlands 6009, West Australia, telefonoj 87 4081, 64 2339.



Neseriozaj Kalmar-kongresanoj je la Seriozeco de Oland.

NIA MEDIO DENOVE

En La Espero numero 2/1973 troviĝas interesa artikolo: "Kien homo?" Eble ĝi estas speciale interesa por mi, ĉar en la sveda revuo "Studiokamraten", nro 3/1973, mi publikigis artikolon, kiu pritraktas la saman problemon el iom alia vidpunkto. Ĉar mi pensas, ke tiu artikolo povus esti kompletigo al "Kien homo?" mi tradukis parton de ĝi:

Ni homoj vivas nek de aŭtoj, nek de lavmaŝinoj nek de kolortelevizio. Tiuj inventoj eble plifaciligas nian vivadon, faras ĝin pli agrabla, sed ne de ili nia ekzistado dependas. Ŝajnas tamen, ke ni kredas, ke tio kion produktas niaj industrioj, estas la plej grava, la centro, en la vivo.

Tiu miskoncepto kondukis al vere maltrankviligaj konsekvencoj. La konstante akceliĝanta fluo de industriproduktaĵoj forpuŝas kaj malfaciligas la produktadon de nutraĵoj kaj en diversaj manieroj venenas kaj difektas nian vivmedion. Sendube ni en la t. n. okcidenta mondo atingis absurde altan vivnivelon, kiu, se ni konsideras kiel vivas la plej granda parto de la homaro, mem fariĝis "minaco al la mondo". Sed ni aĉetis ĝin je vere tro alta prezo. La alegorio, ke ni "desegas la branĉon, sur kiu ni mem sidas", estas vere aplikebla en tiu ĉi rilato.

Multaj certe opinias, ke tiuj "pereoprofetoj" troigas, ke la scienco sukcesos solvi la problemojn. Sed la domaĝoj estas ja jam faritaj, kaj la sekvojn ni jam spertas. Ni povas ĉiutage legi pri teruraj akcidentoj, kaŭzitaĵoj de la detruita medio, kiuj ne nur minacas nin sed jam okazis!

Krome troviĝas ankoraŭ pli grava problemoj: kion longe sufiĉos ankoraŭ tiu materio kaj energio, kiujn ni nun malŝpare foruzas en nia senprudenta strebado al ĉiam pli alta vivnivelo. Kiel ia "mene tekell" ni jam konstatas, ke mankas petrolo en Usono. Ni ankaŭ scias, ke en la evolulandoj milionoj da homoj mortas pro malsato kaj malsanoj dum ni — grandparte je ilia kosto — senkonsidere pligrandigas nian bonstaton. Certe ni kompatis ilin! Sed ni ne volas oferi ion, kio signifus malleviĝo de nia propra vivnivelo. La helpavokoj ricevas verdire la saman respondon kiel la helpkrio en la konata poemo de Gustaf Fröding: "Homon forŝiris la mar", kapitan! — Ĉu jes? ... Snuregon ni jetos ankoraŭ kun sukces'. — Ĉu jes? ... Li dronas —

nun li estas for, kapitan! — Ĉu jes?" (trad. Stellan Engholm).

Pri tiuj problemoj kreskis riĉa literaturo. Speciale interesan kontribuon ni trovas en la jarlibro de la Sveda Asocio por Naturprotektado "Sveriges natur" 1972, kiu dediĉis apartan numeron al la temo "Internacia naturprotektado". Inter vico da specialistoj, kiuj donas siajn opiniojn pri diversaj flankoj de la problemoj, la finno Teuvo Suominen rakontas pri rimarkinda evoluo en Ĉinujo sub la rubriko "En Ĉinujo oni regajnas la defalaĵojn."

Je unua rigardo tiu rubriko eble ne ŝajnas kaŝi ion speciale rimarkindan. Sed fakte temas pri problemoj decida por la estonteco de la homaro: kion fari pri tiu materialo, kiu estas vivnecesa por ni kaj de kiu ni vere ne havas nelimititajn provizojn sed tamen malŝparas, sen konsideri la sekvojn. Tiurilate Ĉinujo verŝajne povas multon instrui al ni, okcidentanoj. Ŝajnas, ke tiu grandega lando, kiu ampleksas kvaronon de la tuta homaro, sukcesis solvi la grandan taskon vivteni sian multnombran loĝantaron tiel bone, ke praktike neniu bezonas malsati.

Por la plimulto de ni estas tre malfacile formi al si klaran bildon pri la evoluo en Ĉinujo sub Mao. Sed tio, kion Suominen rakontas pri tiu ĉi problemoj vere meritas atenton. Ŝajnas, ke tie troviĝas lando, kiu por transvivi elektis vojon, kies signifon ni en la altteknika okcidento ankoraŭ ne komprenas. Anstataŭ senzorge malŝpari la materiajn provizojn, la ĉinoj transiris al tia ekonomia mastrumado pri ili, kian postulas la racio ankaŭ de ni, se ni en la daŭro entute deziras transvivi.

En Ĉinujo oni sistemigis la regajnadon de la defalaĵoj. Paperaj, vitraj, metalaj defalaĵoj estas denove uzataj. El dissolvitaj defalaĵoj oni faras ekzemple rimedojn por plibonigo de la tergrundo, kaj tiun kiun oni ne povas alimaniere uzi oni kunpremas por konstrumaterialo. El la kloakakvo de la fabrikoj oni komence sukcesis gajni nur unu solan uzeblan substancon, nun oni ricevas jam pli ol tridek.

Entute la ĉinoj bone komprenas ke estas grave ne malŝpari materialon. Cio devas esti utiligebla, nenio devas perdiĝi. "Tre dense loĝata vilaĝo en la kamparo estas nekredeble pura. Ne troviĝas tie iuj amasigitaj forĵetaĵoj." Por ŝpari la provizojn de la naturo oni eĉ kelkfoje uzas homan forton. Ekzemple: kie mankas ankoraŭ elektra forto, oni uzas ergometro-biciklojn, kiuj samtempe plibonigas la korpan bonfarton. Nia ega malŝparo de papero estas en Ĉinujo tute neimagebla. Kinobileteto ne estas pli granda ol fingroungo, kaj en la hoteloj ne troviĝas paperkorboj; la turistoj devas kontentigi je cindrujo. Oni ne rajtas foruzi lignon por produkti paperon; rizpajlo estas utiligata por tiu celo.

La malsato apartenas jam al la pasinteco. Sed nun oni ankaŭ suĉas

el la tero nekredeble grandajn rikoltojn. "Kiam la lasta kotono estas rikoltita, kreskas jam freŝaj faboj sub la kotonplantoj. Kaj kiam la faboj estas rikoltitaj, la ĝermoj de la tritiko jam bone evoluiĝis."

La artikolo de Suominen abundas je similaj ekzemploj, kaj se ili estas veraj, oni volonte konsentas kun li ke "la moderna Ĉinujo ŝajnas esti unu el la plej evoluitaj nacioj de la hodiaŭa mondo." Tiurilate eble eĉ la plej evoluita, la plej saĝa.

Aludante al la komenco de tiu ĉi artikolo ni konkludas kun Suominen: "En Ĉinujo la greno nutras la homojn, ne la industriaj produktaĵoj."

Erik Åkerlund

DANKO

La valorajn esperantaĵojn senditajn de; S-ro David Sandström (Malmö); Esperanto kluboj Halmstad kaj Malmö; samid. Sven Möllestad (Kramfors) — tre dankas la "Rumana Esperanto-Biblioteko" Sfintu Gheorghe, Casuta Postala 10.

Cu vi konas la kultur-revuon

NORDA PRISMO?

Se ne; petu provnumeron!

Se jes; abonnu kaj igu abonnu gin!

Jarkolekto: 25 d. kronoj.

Mendo: P. B. 952, DK 2400 NV.

Pago: Per ĝirkonto 905 55, DK.

au per Landmandsbanken, DK 2900.

LINGVISTO, POETO, FILOZOFO



Dum la pasinta vintro alvenis ĉe nia redakcio multaj libroj el la mirinda eldonejo de s-ro Friis en Aabyhoj, Dansk Esperanto-Forlag. Mi devas konfesi, ke pluraj el ili ankoraŭ restas ĉe ni nerecenzitaj: la eldonkapablo de s-ro Friis superas niajn eblecojn recenzigi kaj trovi lokon por la recenzoj.

Inter tiuj eldonaĵoj estas tri, kiuj vekis ĉe mi tiajn personajn sentojn, ke mi decidis ilin mem recenzi: Al Torento, Infanoj en Torento kaj Junuloj en Torento de **Stellan Engholm**. En mia juneco mi legis kun granda entuziasmo tiujn librojn, entuziasmiĝis pro ilia bela, tamen facile komprenebla, tre klara esperanto, sed ankaŭ pro ilia enhavo, pro la ideo, kiun ili prezentas. Tiu ideo, kiu entuziasmiĝis junan koron kaj verŝajne grave influis al mia persona evoluo — ĉiuj bonaj libroj ja influas la legantojn — estas tiel ligita al la aŭtoro, al Stellan Engholm mem, ke tiu ĉi artikolo ne estas ordinara recenzo, ĝi estas rakonto pri unika homo, pri unu el la vere grandaj personecoj en la historio de la esperantomovado.

Stellan Engholm naskiĝis en Stokholmo en 1899, fariĝis popolinstruisto en 1920, kaj tiun vivtaskon li plenumis en kampara medio en Dalekarlio ĝis li mortis, tro frue, en 1960. La ekstera kadro de lia vivo do ne indikas ion speciale rimarkindan. Des pli granda fariĝis lia rolo por la kultura vivo de la esperantomovado.

Paul Almén rakontas aliloke en tiu ĉi numero* kiel Stellan Engholm unue interesiĝis pri esperanto jam en 1920, sed vere li aktivigis nur post sep jaroj, en 1927. Sed tiam li vere aktivigis!

En malmultaj jaroj li tradukis kelkajn el la grandaj verkoj de la klasika sveda literaturo, antaŭ ĉio Gösta Berling de Selma Lagerlöf. Kaj kiam en 1930 oni trovis la lastan tendaron de la sveda esploristo André, kiu veturis per balono al la norda poluso, kaj tio fariĝis mondsencacio pri kiu sveda eldonejo planis libron eldonotan samtempe en pluraj lingvoj, tiam Stellan Engholm plenumis la preskaŭ superhoman taskon traduki la tutan tekston en 20 tagoj — flanke de lia profesia laboro — tiel ke la libro povis aperi samtempe ankaŭ en esperanto.

Ne nur kiel tradukisto sed ankaŭ kiel aŭtoro de originalaj verkoj Stel-

lan Engholm sendube havas sian lokon en nia literaturhistorio. Li havis vastan lingvokonon kaj lia sento por esperanto estis samtempe tiu de lerta lingvisto kaj tiu de poeto. Lian stilon karakterizas simpleco kaj klareco, kaj tamen la lingvo fluas belsone kvazaŭ muziko. Liaj verkoj estas speciale rekomendindaj al novaj esperantistoj ĝuste pro tiu klara lingvo, kiu tamen estas tre korekta; Stellan Engholm estis tre severa pri la ĝusteco de esprimoj kaj vortoj.

La plej grandan servon al la esperantistaro Stellan Engholm eble tamen faris dum la militaj jaroj kiel eldonanto de **Malgranda Revuo**. (Gi aperis ankaŭ dum kelka tempo post la fino de la milito.) Dum mia servo dum tiuj fruaj 40-aj jaroj min sekvis Malgranda Revuo, kaj ĝi apartenis al mia favorata legaĵo en longaj, enuigaj tagoj apud la landlimo. Tiam furiozis la dua mondmilito. Tiam homoj suferis kaj mortis por tiuj patrujoj, kiuj postulis ke ili buĉu unu la aliajn. Vere — Stellan Engholm kaj ni svedoj ja vivis en trankvila angulo de la mondo; ĉe ni estis nek fremdaj armeoj, nek falis bomboj. Sed psikologie la milito estis ankaŭ ĉe ni, kaj eĉ ĉe ni ne estis tempo por idealistoj. Tiam oni aŭskultis nur al la realistoj, kaj en ilia mondo parolis la kanonoj, falis la bomboj, ruiniĝis urboj, domoj, homvivoj.

Sed Malgranda Revuo de Stellan Engholm reprezentis alian mondon. Vere, ankaŭ ĝi ne estis fermita por la realaĵoj. Multaj artikoloj temis pri la milito, venis el la militaj landoj mem. Sed la spirito de tiu revuo tamen estis alia, tie regis ankoraŭ la optimismo, la kredo pri la venko de la ĝusteco kaj la bono, komprenemo kaj toleremo. Kaj tiu spirito aperis antaŭ ĉio en la artikoloj de Stellan Engholm mem. Lin neniam ekflamiĝis la militaj paroloj, li neniam kondamnis iun, li havis profundan komprenon por la homoj, per li parolis ankoraŭ la humanismo, la idealismo, la homeco.

"Se mi estus pentristo, kaj se mi volus pentri poeton, mi elektus kiel modelon Stellan Engholm: helaĵ, belaj okuloj revantaj, alta frunto serena, buŝo sentema." Tiel skribis Ernfrid Malmgren en tiu memora numero de La Espero, kiu aperis post la morto de Stellan Engholm. Je la

sama okazo karakterizis lin jene Tiberio Morariu: "Per sia silenta, saĝa, trankvila, pensoriĉa vivado li memorigis pri granda filozofo hinda..." Tiujn filozofajn trajtojn manifestigis ne nur en lia verkaro, sed evidente en lia tuta vivado. Li, filo de la grandurbo, elektis vivi en la kamparo. Tie, en la arbar-kaj montoriĉaj partoj de Dalekarlio, proksime al tiuj urbetoj kun feruzinoj kiuj evidente estas la modelo por "Torento", for de la homamasoj, en la sino de la naturo, li povis pensi kaj formi sian mondpercepton.

La supre menciitaj tri libroj estas reeldonoj — la antaŭmilitaj eldonoj jam delonge estas elĉerpitaj — kaj kune kun Vivo Vokas, kiu, eldonita de Eldona Societo Esperanto en 1960, estas ankoraŭ havebla, ili formas tutecon. Kun escepto de la unua, Al Torento, ili rakontas ĉefe pri la samaj homoj.

Ili formas tre interesan rakonton pri la vivo de la homoj en tipa mezsveda feruzina vilaĝo dum la jaroj inter la du mondmilitoj; ili respegulas la sentojn, la ideojn de la 30-aj jaroj, speciale tiuj de laboristaj rondoj. Sed ili donas samtempe belan bildon pri la evoluo, korpa kaj spirita, de kvar geknaboj, en tiu medio dum tiuj jaroj. Mi fakte ne kontaktigis kun iu verko en nia sveda literaturo, kiu tiel koncentrite en formo de interesa rakonto redonas la etoson de la medio de industrilaboristoj en svedaj urbetoj dum tiuj jaroj, kaj ili vere meritas lokon inter la klasikaj verkoj de nia literaturo.

La filozofio de Stellan Engholm, lia tuta mondpercepto estas ankaŭ koncentrita en tiu verkaro pri la homoj en Torento. Sed ĉu tiu lia mondpercepto, liaj pensoj, lia idealismo, povas interesigi modernajn legantojn? Ĉu al ni kaj ankoraŭ pli al la nuntempa junularo ili ne ŝajnas naivaj, apartenantaj al alia tempo kaj alia mondo? Nu, legu la jenan eltiraĵon el Vivo Vokas (Stellan Engholm parolas per la buŝo de sia romanfiguro Eriko kiu partoprenis kiel volontulo la hispanan civilan militon kaj revenis seniluziiginta):

"Tiam komencis ŝajni al mi, ke tiuj kiuj volas plibonigi la mondon por la homoj, ofte forgesas la esencan aferon, la homojn mem, kaj tio okazas precipe dum militoj. Kiel simpla, sola homo mi rigardis ĉirkaŭ mi kaj vidis, kiel homoj sekvas siajn ima-

gojn kaj pro siaj imagoj suferas kaj suferigas, mortigas kaj mortas. Mi vidis soldatojn kaj mi vidis civilulojn, terurojn kaj eĉ morton. Ili vidis nur siajn imagojn kaj ili apartenis al la granda amaso.

Sed mi estis sola, kaj mi vidis nur malsatajn homojn, vunditajn kaj disŝiritajn homojn, senhejmajn homojn, skeletosimilajn infanojn, senfine da homoj en mizero. "Tio estas la ofero por la feliĉo de la estonto, de la estontaj homoj" diris mia lernitaĵo. "Tio estas viktimoj pro imago" respondis miaj pensoj de simpla, sola homo.

Oni diris pri la mortigitoj en la mondmilito, ke ili malgraŭ ĉio ne vane falis: post ili venos eterna paco. Pasis de tiu tumulto nur dudek jaroj, sed jam la nuna situacio pli promesas eternan mortigon ol eternan pacon.

Cetere — se mi estus homo estonta, mi hontus akcepti feliĉon kiu baziĝus sur mortigo de centmiloj kaj milionoj da homoj dum longa ĉeno de ĉiam militoplenaj jarcentoj..."

Cu vi vere opinias, ke tiuj vortoj, tiuj pensoj, estas hodiaŭ malaktualaj?

Ake Blomberg

* *Aperos en sekvonta numero.*

VERKOJ DE STELLAN ENGHOLM:

AL TORENTO

broŝ. Krj. 14: 40

INFANOJ EN TORENTO

broŝ. Krj. 15: 60

JUNULOJ EN TORENTO

broŝ. Krj. 20: 90

VIVO VOKAS

bindita Krj. 11: 75

La prezoj inkludas imposton.

Ĉiu libro estas aparta rakonto kaj legebla sen kono pri la aliaj. Sed la kvar libroj ankaŭ formas tutecon, kaj kune ili estas unika historio pri la vivo en sveda urbeto en "Bergslagen" dum la 30-aj jaroj.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Fack, 200 42 Malmö 7

Poŝtĝiro 578-5

Ni legis

LA INTERNACIA KUIR-LIBRO, kompilita de J. Schorter-Eyck, eldonis BEA, broŝ., prezo ĉe Eldona Societo Esperanto, Malmö, sv. krj. 25: —.

Jen bonvena libro en la esperantomondo.

Ĝi prezentas 500 receptojn el 100 landoj, plej variaj kaj plej interesaj. Krome kuiradan terminaron esperantan kaj kelkajn praktikajn sugestojn, ekz. kion fari pri trosalita supo. Rekomenda enkonduko de s-ino Nora Holmes.

Libro rekomendinda al ĉiuj kiuj interesiĝas pri kuirarto kaj fakte ne nur al sinjorinoj!

obo

SUB LA VERDA STANDARDO de P. Korte. Dansk Esperanto-Forlag. Prezo: Laborilo II 8: 25 sv. krj, Gvidilo 9: 10 sv. krj.

Antaŭ nelonge fine aperis la atentataj Laborilo II kaj Gvidilo por instruistoj de la konata kaj sukcesa lernolibro Sub la standardo (vidu la recenzon en la 6a nr de 1972 de La Espero).

Laborilo II estas daŭrigo de Laborilo I. Ĝi enhavas lecionojn 21—40. Pri ĝi mi ne multon devas aldoni. Sufiĉas nur ripeti, ke kvalito kaj valoro de tiu ĉi lernolibro estas sendiskute granda, precipe por ĝia internacia uzebleco.

Gvidilo por instruistoj estas tre zorgeme ellaborita. La aŭtoro trairas la pedagogiajn aspektojn de sia metodo paŝon post paŝo. La klarigoj por la instruisto estas koncizaj kaj detalaj, sed samtempe lasas spacon por individua fantazio kaj eltrovemo de tiu, kiu volas instrui. P. Korte — laŭ sia propra eldiro — donas nur "sugestojn", kiuj neniel devas ligi la instruiston.

Ni povas esperi, ke tiu ĉi lernolibro estos bona instrumento en nia "batalo" por akiri novajn adeptojn de la ideo de la Internacia Lingvo. Per la multaj reldonoj ĝi pruvis, ke ĝi estas instrumento plej konvena.

I. A.

SENNACIECA REVUO n:o 100

Dika kajero, plenshopita per longaj artikoloj, zorga tralego postulas horojn. Bona papero, bela preso. Ne tro abundas la preseraroj, sed; enas tiu kelkfoje rebusa transskribo de nomoj esperante. Ofte neregula, senkonsekvencia kaj nekongrua, eĉ groteska. Ekz. Kromŭel, Grinŭiĉo, Bon-

no (Bonn) k. t. p. Sajnas al mi preferinde uzi aŭtentikan ortografion.

Tre valora artikolo de S. Aarse: La fonto de la arto. Lerte verkita, flua lingvo. Sed kiel oni povas trakti tiun temon, grandparte pri sociaj kondiĉoj de artistoj en burĝa, kapitalisma socio sen kompari ankaŭ aktualan situacion, samajn kondiĉojn en la socialisma mondo, speciale en Sovetio? Ĉu la kondiĉoj pliboniĝis en tiu socio?

Ofte oni renkontas en la teksto la polvokovritajn, ŝablonajn ideojn el la socialisma kliŝoforgejo. Tamen la enhavo estas leginda kaj grava.

S. A. J.

Multfaceta legolibro

Elegante ekipita (per bela kovrilo desegnita de hungara artistino Ēva Váli) aperis la kvina eldono de **ESPERANTA LEGOLIBRO** de **ELIO MIGLIORINI**, profesoro ĉe la Literatura Fakultato de l'Universitato en Romo; eldonita de la Itala Instituto de Esperanto. Ĝi tiu internacia instruilo enhavas 256 plezurigajn paĝojn kaj estas mendebla de la Eldona Societo Esp. en Malmö.

Metodologie dividita en tri partojn: 1) **Tra la Vivo** 2) **Tra la Lingvo** 3) **Tra la Literaturo**. Ĝi komenciĝas per proverboj: "Kiun reĝo protektas, tiun ministro elektas. Kiu volas mensogi, devas bone paroli. Lupo ŝanĝos la harojn, sed ne la farojn" — memorigante pri la klasika enkonduko de Zamenhof al sia Esp-a Proverbaro: Venas proverbo el popola cerbo... La verko finiĝas per la klasika poemo de Zamenhof: La Vojo, lumture montrante la vojon tra gradigitaj legaĵoj al perfektigo en la Internacia lingvo.

Post la proverboj sekvas Spritaĵoj: — Sinjoro, via hundo manĝis unu el miaj kokinoj. — Dankon, bona homo, pro via averto. Hodiaŭ vespere mi ne donos al ĝi manĝaĵon...

Sur la 21-a paĝo oni rerakontas la spritaĵoj de la Cseh-kursoj pri la muŝoj falintaj en la glasojn de internacia societo kaj la nacian reagon. Popularsciencaj temoj pri Karbo kaj petrolo, La kverko, Hieroglifoj, Horloĝo, Termitoj ktp.

El la dua parto p. 82 citindas la vortoj de E. Privat "Pri stilo": "En niaj verkaĵoj ni ĉiam pli kaj pli respektu la rajton de la leganto kaj klopodu lin plezurigi per kiel eble plej diafana kaj flua stilo, kiel bela, pura rivero de niaj ideoj. En niaj ler-

nolibroj kaj kursoj ni helpu la lernantojn forgesi por Esperanto sian nacilingvan stilon. Kaj ni kutimigu ilin je la Esperanta "spirito de la lingvo". Verkantoj kaj lernantoj la plej bonan instruadon trovas en ĉiam pli ofta legado. Ni legu kaj ni relegu! Jen nia nepra bezono."

La **tria parto** abundas je menciindaĵoj. Lokomanko malebligas menciigi ĉiujn. Sed nepre ni citu kelkajn titolojn: Latina leciono (E. Privat), Knabo kaj birdo (Stellan Engholm), Adamo kaj Evo (F. Szilágyi), Por paco (M. Boulton).

Fine ni citu de sur 226-a p. "Tri vizaĝojn" de Rumana Akademiano Lucian Blaga:

Ridas la infano:

"Saĝeco kaj amo estas mia ludo!"
Kantas la junulo:

"Ludo kaj saĝeco estas mia amo!"
Silentas la maljunulo:

"Amo kaj ludo estas mia saĝeco!"

Kiel tradukinto staras la nomo de Tiberio Morariu. Sed fakte EUGENIA Morariu faris ĉi tradukon.

Io Iu

ÅRHUS

24-paĝa broŝuro en esperanto.

Belaj koloraj bildoj, abundas utilaj informoj por turistoj. Enhavas planon pri la urbo kaj mapo pri Danlando. Havebla ĉe Turistforeningen, Rådhuset, DK 8000 Århus C, Danlando.

GOTENBURGO

Aperis granda luksa mapo pri la urbo Gotenburgo kun informa teksto en esperanto kaj belaj koloraj bildoj. Tiu broŝuro estas presita en 20.000 ekz. Eldonis la Turist-Trafika Asocio de Okcidenta Marbordo laŭ iniciato de INTER — Agadgrupo por Esperanto, kiu respondas pri la traduko. Havebla ĉe Oficejo de Turismo, Parkgatan 2, Gotenburgo, Svedujo. Ĝin prefere petu eksterlandanoj, sed ne forgesu havigi ĝin por viaj eksterlandaj gastoj aŭ kunportu ĝin mem al viaj eksterlandaj geamikoj!

STIRIO-STEIERMARK

Bela esperanta faldprospekto pri la aŭstria provinco Stirio kun ĉefurbo Graz. Havebla ĉe Esperanto-Societo Unueco Graz, Josef Eder, Eggenbergergürtel 32, A-8020 Graz, Aŭstrio, kontraŭ unu resp. kupono.

VÄSTERÅS IMPONAS



En Västerås laboris dum la lasta jaro agadgrupo por esperanto kaj 14—26 de majo oni aranĝis ekspozicion en la urba ĉefbiblioteko. La grupo konsistas el tri personoj: Chris Vos, Wim Posthuma kaj Kaj Stridell.

Kiel bazo por la ekspozicio oni uzis la migrantan materialon de SEF, kiu en si mem estas sufiĉe bona, sed la propraj aldonajoj de la grupo estis tiom ampleksaj kaj allogaj, ke la baza ekspozicio preskaŭ dronis.

Oni ricevis tre oportunan lokon en la granda halo, tiel ke la vizitantoj enirinte tra la pordo tuj ekvidis la ekspozicion.

Sur eleganta ligna stativo laŭ la maldekstra kaj malantaŭa flankoj pendis esperantaj gazetoj kaj jurnaloj el la tuta mondo, proksimume cent diversaj. Ili estis pendigitaj tiel, ke oni facile povis depreni ilin por pli serioza rigardo.

Sur 14 grandaj montrotabuloj oni prezentis nian lingvon el ĉiuj vidpunktoj. Sur la unua tabulo oni skribis tiajn demandojn, kiujn oni antaŭvidis de la publiko kaj donis ankaŭ respondojn. Kelkaj rubrikoj sur la aliaj tabuloj povas doni imagon pri la enhavoj: Senaste nytt — Behövs det flera språk, när det redan finns 3.000? — Turism och reklam — Tag esperantovägen! — Språk och imperialism — Delegationen — Debatten i Västmanlands Läns Tidning — Språk som skiljemur eller bro — Varför göra det lätt för sig, när man kan krängla till det? — Olika sätt att lära sig Esperanto — Esperantos byggnad i ett nötskal — Esperanto i radio och TV. — Fine ankaŭ tabulo pri la kursoj de TBV, ĉar tiu organizo ekonomie subtenis la ekspozicion.

En specialaj vitrujoj oni montris la esperantan literaturon kaj donis ekzemplojn pri korespondado kaj filatelio k. t. p. Ĉe du tabloj estis gramo-

fono kaj magnetofono, kie interesuloj povis aŭskulti esperantajn parolojn kaj kantojn pere de telefonaj aŭskultiloj ne ĝenante aliajn vizitantojn. Oni devas supozi, ke persono, kiu serioze trarigardas la ekspozicion, certe konvinkigatas pri la taŭgeco de esperanto kaj ĝia jam ampleksa agadkampo.

La aranĝintoj vere estas gratulindaj, kaj oni varme esperas por ili abundan rikolton.

RS

Informationsmaterial

NYCKEL (med moms 0:60) och **VÄGISARE** (samma pris) köpes hos Förlagsföreningen Esperanto, Fack, 200 42 Malmö 7. Postgirokonto 578-5.

BROSCHYRER tillhandahålles av SEF. Tag kontakt med sekretariatet i Stockholm per brev eller telefon angående pris och sort.

AFFISCHER (större, A 1 och A 2) finns i mycket begränsad utsträckning. Skriv till Jan Ströme, Amiralsgatan 36, 211 55 Malmö.

*

Vid alla förfrågningar var vänlig medsänd svarsporto.

Sorto de peticio

En la jaro 1965 Einar Dahl kaj Sven Mellqvist (socialdemokratoj) en la sveda parlamento prezentis kvarpartian proponon pri la bezono de internacia lingvo. Ili deziris, ke U.N. kunmetu scienca komisionon kun la tasko de senpremisa enketo pri la eblecoj de internacia lingvo flanke de la diversaj naciaj lingvoj.

En februaro 1965 la prepara komisiono de la parlamento decidis principe apogi la proponon, sed demandis ĉu UNESKO ne estus pli taŭga forumo ol U.N. La proponintoj konsentis, kaj la 10-an de marto 1965 la parlamento decidis unuanime akcepti la eldiron de la komisiono.

La 7-an de majo 1973 la Ministro por Edukado, Ingvar Carlsson, en la parlamento faris la jenan deklaron responde al demando de parlamentano Mellqvist (resumo): Laŭ la decido de la parlamento la Sveda UNESKO-konsilantaro en 1965 preparis proponon pri rezolucio pri internacia helplingvo al la ĝeneralaj konferencoj de UNESKO en 1966 kaj 1968. Oni serĉis apogon ne nur ĉe la aliaj nordaj landoj sed ankaŭ ĉe granda nombro da aliaj membroŝtatoj de UNESKO. Laŭ propono de la konsilantaro la sveda delegacio ĉe tiuj konferencoj ricevis de la sveda registaro la taskon prezenti la proponojn pri rezolucio, kiujn ellaboris la konsilantaro. Tiuj klopodoj ĝenerale malsukcesis. En 1966 kaj 1968 la nordlanda propono estis prezentata en la subkomisiono por sociaj kaj kulturaj demandoj, sed ambaŭfoje la komisiono decidis ne akcepti la proponon.

En junio 1969 la nordlandaj UNESKO-komisionoj je sia komuna kunveno pridiskutis la eblecojn ankoraŭfoje prezenti la proponon je la ĝenerala konferenco kaj konkludis, ke la situacio ne ŝanĝiĝis kaj ke la propono ne havas ŝancon esti akceptata. Sekve de tio la Sveda UNESKO-konsilantaro decidis ne proponi al la registaro denove prezenti la proponon je la ĝenerala konferenco 1970. Oni same negative prijuĝis la aferon antaŭ la ĝenerala konferenco en 1972.

S-ro Palm (socialdemokrato) kiu anstataŭ s-ro Mellqvist, kiu ne povis ĉeesti, akceptis la respondon de s-ro Carlsson, dankis al la ministro kaj konstatis ke malgraŭ la malfacilaĵoj je la internacia nivelo la sveda registaro evidente ne povas esti akuza-

ta pro manko da intereso nek pro indiferenteco pri tiu ĉi demando. — Li tamen tre bedaŭris, ke la proponoj ne donis rezulton, konstatis la bezonon de internacia lingvo kaj kritikis la tradician, sterilan konservativismon, kiu kaŭzas, ke eĉ tiuj landoj kiuj plej profitus de nova ordo en la lingva kampo evidente ne komprenas tion kio por ili estus plej bone. "...ke internacia helplingvo estus racia solvo estas evidente. Nur se esperanto estus rekonita kiel unu konferenca lingvo ekzemple en U.N.-rilatoj estus granda progreso... Tio povus esti racia vojo por atingi pli grandan kulturalan egalecon — nocio ankoraŭ tute nekonata en la plej granda parto de la mondo." — Li esperis, ke "tiuj entuziasmoj kaj antaŭvidemuloj, kies reprezentanto mi ĉi tie provas esti, ne laciĝos. Ili estas, kompreneble, longe antaŭ sia tempo."

La redaktoro volas nur aldoni, ke la agado je parlamenta nivelo en Svedujo kompreneble ne estas finita kaj certe ankaŭ ne estis la lasta propono pri internacia lingvo ĉe UNESKO aŭ U.N. Ambaŭ agadkampoj estas kompreneble ege gravaj, kaj malgraŭ la ĝisnunaj negativaj rezultoj troviĝas ankaŭ pozitivaj signoj. Nur la pritraktado en la sveda parlamento kaj de la sveda registaro rilate al la propono de 1965 estas jam progreso.

Budhana misio

Misio konsistas el belaj vortoj

Sed ĉio estos vana

Se oni ne agas

Laŭ misio.

Vana estos ĉio

Kiel bela floro sen odoro.

Bela misio

Ĉiam estos sukcesplena

Se oni fervore kaj korekte agas

Kiel beleco de floro bonodora.

Laŭ eldiro en "Dhammapado"-antologio, konsistanta el 423 versoj en Lingvo Pali — kolektitaj el la fama verko Tripitaka, kiu enhavas instruon de Buddha.

Lakshmiswar Sinha

Gunnar Helén pri Esperanto

Responde al demando de Ragnar Hjorth pere de Dagens Nyheter la estro de la liberala partio, Gunnar Helén, konstatas, ke la angla lingvo nuntempe ne plu tiel dominadas kiel antaŭ 15—20 jaroj. La franca estas multe pli uzata inter la diplomatoj, la germana gajnas influon pro la Eŭropa Komunigo kaj la rusa estas oficiala lingvo en internaciaj organizaĵoj. Sed, konstatas Helén, mia opinio estas ke oni devas labori per la vivantaj lingvoj.

Ĉia artefarita produkto havas siajn mankojn (varje konstprodukt har sina handikapp).

La demando kaj la respondo aperis la 15/7 inter pluraj aliaj demandoj kiujn faris legantoj de la granda tagjurnalo al Helén kaj al kiuj li donis mallongajn respondojn. Al tio oni nur povas aldoni ke tiuj pravas — inter ili ankaŭ Ragnar Hjorth — kiuj kontraŭis la mocion ĉe la ĵarkongreso de SEF ke oni oficiale demandu la partiestrojn nun antaŭ la gravaj ĝeneralaj elektoj pri ilia sinteno al esperanto. Gunnar Helén tutsimple ne sufiĉe scias pri esperanto: kvankam li sufiĉe realisme prijuĝas la lingvan situacion li — same kiel multaj aliaj personoj en publikaj pozicioj — evidente sentas sin devigita havi personan opinion pri problemoj, kiujn li ne pristudis kaj pri kiuj li ne multon scias. Kio, ekzemple, estas la diferenco inter "vivantaj lingvoj" kaj "artefarita produkto"? — Verŝajne la aliaj partiestroj ne pli bone konas la aferon. Fakte kulpas ankaŭ ni mem. Ni devas evidente multege pli informi pri esperanto.

oho

La Dan-Sveda

La 2-an de septembro 1973 okazos la Dan-Sveda Esperantotago en Landskrona kaj sur Ven. En Landskrona la urbo regalos la partoprenantojn per kafo. Poste ili vojaĝos per ŝipo al Ven por rigardi la insulon kaj havi komunan lunĉon kaj amuzan kunestadon.

Unu Dio, Unu Mondo, Unu Interlingvo

Hindujo estas vasta lando, kaj tie estas parolataj ankaŭ multaj diversaj lingvoj. La angla lingvo havas fortan influon. Ĝi estis adoptita dum la 200-jara regado de Britujo en nia lando. Unu el la ĉefaj celoj estis tiam akiri malmultekoste hindajn ofi-cistojn. La hindoj akceptis la anglan lingvon parte por akiri honorigajn ŝtatajn postenojn, parte por ekkoni kaj lerni la okcidentan sciencan, teknologian, literaturan k. t. p.

Post la sendependiĝo de Hindujo en 1947 la lingva situacio en Hin-

vis tiam grandan emon lerni la novan lingvon, ĉar ni devas ĉiuj lerni kvar lingvojn: bengalan, hindian, sanskritan kaj anglan, kio kaŭzis al mi multe da penado kaj malagrablaĵoj. Mi ankaŭ dubis, ĉu esperanto estas uzebla kiel utila komunikilo kaj ĉu ĝi efektive utilis al mi. Tamen, vole nevole mi lernis sufiĉe diligente dum tre mallonga tempo.

La esperantomovado en Hindujo estas relative nova. Certe troviĝas en nia vasta lando multaj junaj hindoj, kiuj lernis esperanton kaj havas



De maldekstre: N. Sinha, Hindujo, J. de Campos Bretas, Brazilio,
Y. Saito, Japanujo.

dujo ŝanĝiĝis. Mahatma Gandhi, la estimata patro de la hinda nacio, penadis enkonduki simpligitan lingvon Hindi anstataŭ la angla. Li fondis instituton por la disvastigado de tiu lingvo, kaj tiu instituto nuntempe tre fervore kaj vigle laboras en ĉiuj partoj de la lando.

Antaŭ la jaro 1947 ĉiuj ekzamenoj okazis nur en la angla lingvo, sed post la sendependiĝo oni rajtas skribi kaj respondi al demandoj en la respektivaj gepatraj lingvoj. Sed ĉar Hindujo havas multajn lingvojn, tiu solvo postulas tempon.

Kiam mi finis mian kurson ĉe la altlernejo, mia patro, kiu ja estas unu el la veteranaj hindaj esperantistoj, instruis al mi esperanton sen uzi tekston, ĉar tiutempe esperantlingvaj libroj ankoraŭ ne estis eldonitaj en Hindujo. Krome mi ne ha-

bonan kontakton kun esperantistoj en aliaj mondpartoj, kiel mia intima amiko Probal Daŝgupto, kiu tre aktive agadas por la esperanto-movado. Ankaŭ mi komencis uzi esperanton kaj dank' al ĝi mi povis veni al la centro de Oomoto por lerni la japanan lingvon, studi la kulturon kaj historion de Japanujo kaj la doktrinon de Oomoto.

Oomoto, Universala Homama Asocio, estas tre konata en la esperantomondo, ĉar jam antaŭ kvindek jaroj ĝia fondinto Onisaburo Deguĉi — kiun oni nomas majstro — adoptis esperanton ne nur kiel propagandilon sed ankaŭ kiel lingvon oficialan por ĉiutaga uzo.

Tiel mi povis akiri pli profundan konon pri la fundamentaj karakteroj de la japana popolo, ĉar mi povis havi senperan kontakton kun diver-

saj homoj. Mi spertis ilian disciplinon, diligentecon, paciencon, belan guston kaj respekton por la vero.

Mi tre ĝojas ke junaj geamikoj ĉe Oomoto pli kaj pli interesiĝas pri la spirita vivo kaj religio, ĉar en Japanujo ĝenerale okazas senreligiigo, precipe ĉe la juna generacio. La junaj Oomotanoj penadas revigi kaj konservi la spiritan vivon, praktike en la ĉiutaga vivo tion, kio estas plej bona en religio.

Sendube, mi multon profitis el mia restado en Japanujo. Ĉe la centro de Oomoto ĉiuj estas afablaj al mi. En mia juna vivo mi neniam antaŭe spertis tian homecan etoson. Konklude mi volas diri, ke la fundamentaj principoj de Oomoto: Unu Dio, Unu Mondo, Unu Interlingvo, estas la sola vojo por unuecigo kaj harmoniigo de la homaro. Tial ni ĉiuj nepre devas agi, agadi, por atingi tiun noblan celon.

Nikhiles Sinha

Atentigo de la redaktoro

La originala manuskripto de Nikhiles Sinha, filo de Lakshmiswar Sinha, estas bedaŭrinde tro longa por La Espero. Ĉar ĝi enhavas multon, kio povas havi intereson por niaj legantoj — ekzemple la studvojo de hinda junulo — ni redaktis resumon kaj esperas, ke la aŭtoro tion pardonos.

Eĉ guto . . .

Cu vi atentis pri la artikolo en la pasinta numero pri la monkoklektado por SEF. La intenco ja estas financi antaŭ ĉio la lernejan kampanjon. La poŝtgira konto estas 66 41 50-0, Svenska Esperantoförbundet, Informationskonto. Vi povas donaci pli ol 100 kronojn, precize 100 kronojn aŭ mendi kajerojn de "esperantofemmor" je 25: — kronoj po kajero. Tio estas la tri alternativoj, kiujn ni proponis al vi, sed kompreneble vi rajtas pagi ankaŭ alian sumon.

Eble vi estas sola esperantisto en via loko. Aŭ vi pro personaj kaŭzoj ne havas eblecon aktive labori por esperanto. Jen vi havas vian ŝancon tamen doni al SEF utilan apogon.

Ni anticipe dankas!

Veteranoj forpasis



La 15-an de majo forlasis nin por ĉiam nia membro G. W. Wahlund en aĝo de 86 jaroj. Por la pli junaj esperantistoj li certe estis sufiĉe nekoniata, kvankam lia nomo aperis sur ĉiu numero de La Espero. Li ja estis respondeca eldonanto ekde la unua numero aperinta en februaro 1913, do dum 60 jaroj.

Li naskiĝis en Gävle, esperantistiĝis en 1905 estis estrarano en la esperantoklubo tie dum kelkaj jaroj. 1913 okazis Tutsveda Esperantotago en Gävle iniciatita de Wahlund. Je tiu kunveno oni akceptis novajn statutojn por Sveda Esperanto-Asocio kaj Wahlund estis elektata vicprezidanto.

79-jara li partoprenis la universalan kongreson en Tokio 1965. Al la familio ni esprimas nian profundan kondolencan.

Bertil Akerberg

HELGE NOREN

en Helsingborg mortis 10 junio 1973 post longe-daŭra malsano, 63-jara. Li aliĝis al la Esperantoklubo de Helsingborg en 1950, sed li estis esperantisto jam de 1931. Li estis fidelela membro de la klubo kaj sindona ano de la Zamenhofa ideo, kaj ni danke lin rememoras.

OE

ARTUR LUNDGREN

Helsingborg, mortis 26 junio, preskaŭ 75-jara. Li esperantiĝis jam en la jaro 1914 kaj aliĝis al nia klubo en 1948. Dum multaj jaroj li estis fakdelegito de UEA. Ĉe ABF li instruis esperanton dum multaj jaroj. Li estis sperta kursgvidanto kaj sindona esperantisto kaj dum multaj jaroj la ĉefa motoro de la klubo. Ĉiujare, dum la Internaciaj Feriaj Kursoj en Helsingör, Artur Lundgren estis la organizanto por la komuna vizito de la kursanoj al Helsingborg.

OE

La redakcio atentigas, ke ni preskaŭ senescepte mallongigas nekrologojn. Ni sentas same profundan respekton al forpasintaj agantoj kiel sentas la raportantoj, sed manko da spaco fakte ne permesas al ni aperigi multon pli ol mallonga mencio. Niaj legantoj bonvolu atenti, ke tri-levraj frazoj ofte reprezentas tutan vivon dediĉitan al sindona agado por esperanto!

Korespondas

KUBO

24-jara teknikdesegnisto, Felipe Felipe, Calle 23 nro 1613 apt. 31, e/28 Y 30 Vedado, **Habana** 4, Cuba.

ĈEĤOSLOVAKIO

Nur per bildkartoj, Zdenko Komberc, Boz. Nemcove 13, 552 03 Ceska Skalice I, Ĉeĥoslovakio.

O. R. E.

O. R. E. = Ornitologia-Rondo-Esperantlingva

Sciante ke multaj geesperantistoj ankaŭ estas naturamantoj, mi volas atentigi vin pri esperanto-fakorganizado, kiu praktikas nian internacian lingvon en natursciencaj kampoj — precipe ornitologio. O. R. E. fondiĝis en 1961 post sugesto de aro da personoj kiuj partoprenis la enketon de S-ro W. De Smet, Belgio, pri la alvendo de la kukolo en diversaj eŭropaj landoj. En la unuaj jaroj de ĝia ekzisto la rondo baraktis kontraŭ aro da malfacilaĵoj, sed la entuziasmo, laboremo kaj financa helpo de iuj gemembroj privenkis ĉiujn malhelpaĵojn kaj en la fino de 1972 O. R. E. jam havis pli ol 200 membrojn en 26 landoj, aktivan delegitaron en 21 landoj kaj aron da delegitoj — specialistoj, kiuj informas la anaron pri eroj el la ornitologio.

La celoj de la rondo estas fari propagandon por esperanto inter ornitologoj kaj naturamantoj, krei kontakton kun samcelaj asocioj, partopreni en ornitologia esplorado kaj peri kontakton inter la esperantoparolanta anaro. Tiaĉe O. R. E. ekzemple kunlaboras en la "Asocio por Vivprotektado", kolektas fenologiajn datojn (de ses birdoj), partoprenas la vintromezan nombradon de akvobirdoj k. t. p. La rondo aranĝas ĉiujare renkontiĝojn por la anaro kaj por interesigintoj. Plej ofte la renkontiĝoj okazas en kunligo kun pluraj festotagoj, dum U. E. A. kongresoj aŭ aliaj esperantoaranĝoj. En 1967 la anaro havis okazon partopreni unusemajnan aranĝon en la popola alternejo kaj naturrezervejo "De Blaarkaart" en Woumen, Belgio. La temo de ĉi tiu kurso estis "Homo kaj Na-

Konstrui per

YTONG[®]

estas konstrui

ekonomie

brulsekure

YTONGBOLAGEN

Hällabrottet

turo", rigardata el diversaj vidpunktoj. La kurson ankaŭ partoprenis aro da neesperantistoj, kaj tio donis al ni okazon propagandi por esperanto! Komunaj aranĝoj inter esperantistoj kaj neesperantistoj eble estas konvena vojo por vekti intereson por nia lingvo? Dum niaj renkontiĝoj okazas jarkunveno, prelegoj, debatoj, studvizitoj kaj antaŭ ĉio ekskursoj.

Ek de 1964 nia rondo eldonas propran revuon "La Mevo", kiun ricevas ĉiu membro senpage, kondiĉe ke li/ŝi estas paginta sian jarkotizon por la kuranta jaro. Sen troigo oni povas diri, ke la revuo jaron post jaro fariĝis pli bela kaj pli interesa. Kaj dank al la "Premio Simondetti" ni ĉiam akiras altnivelajn tekstojn por ĝi! Menciante pri la "Premio Simondetti" mi volas aldoni kelkajn vortojn. Ci tiun premion disdonas O.R.E. ĉiujare kiel rekompenco por la plej bona teksto en Esperanto pri iu temo de la naturo. La premio havas valoron de 1000 belgaj frankoj kaj ĝin povas akiri ankaŭ nemembroj kaj neesperantistoj, sed la verkinto de alilingvaj artikoloj mem devas havigi tradukinton por sia verkaĵo, ĉar nur esperantotekstoj estas akceptitaj. Sendu vian verkaĵon plej malfrue en decembro al Manuel Halvelik, Gebroeders Blommensstr 41, **Borghout, Belgio**. Sciigu, ke viaj verkaĵoj partoprenas la konkurson "Simondetti."

Dum niaj renkontiĝoj kaj dum respondado ni tre baldau sentis la mankon de kompleta birdnomo kaj de tempo al tempo ankaŭ mankis nomoj el la morfologio de birdo. Post senlaca penado de nia nomenklatura komisiono sub gvido de R. Bossong en 1971 finfine aperis "Komunlingva nomaro de eŭropaj birdoj" eldonita de Esperanto-press en Cardiff, Kanado. La libreto estas ricevebla ĉe Ru Bossong, Floraplein 23, Eindhoven, Nederlando kaj kosta ĉirkaŭ 5:— Kr.

La sveda O.R.E. kolektivo havas pli ol 30 membrojn sed grandparte mankas la esperanto-junularo inter ni — kaj tamen estas la junularo kiu plej intense observas la birdaron. Ĉiam uzu Esperanton por viaj ŝatokupoj!!! Eble miaj linioj vekis vian intereson pri O.R.E. Fariĝu membro en ĝi. La jarkotizo estas 7.— Kr kaj ĝin vi pagu al: Luise Karlsson, Telegrafg. 5, 149 00 Nynäshamn. Girkonto 69 92 61-4. Bonvenon en nia rondo!

Ere — parkere

ERE — PARKERE

I Esperanto har vi en rik skatt av ordspråk. Zamenhof har genom sin Proverbaro Esperanta, i vilken han gav oss en samling ordspråk, gjort en verklig kulturgärning. Där bevaras en säregen, gammal folkvisdom från olika länder och tider i en ofta poetisk och språkligt egenartad form.

Ordspråken har utan tvekan inte bara ett kulturellt värde utan även ett språkligt. De bidrar till att bibehålla enhet och uttrycksfullhet såväl i det muntliga som i det skriftliga språket.

Vi kommer därför i Svenska-Esperanto-Tidningen att under den här rubriken regelbundet ge ordspråk, men även andra sentenser, meningar och satser ur vår litteratur, vilka påtagligt visar Esperantos underbara uttrycksmöjligheter. Kalla detta gärna en programmerad ordspråkskurs. Den vill hjälpa dig i viss mån till bättre kunskaper i Esperanto men framför allt till bättre känsla för vårt språk och om möjligt större kärlek till det.

Vi ber dock få påpeka att detta inte är någon ersättning varken för fortsättningskurs eller för litteraturstudier. De är absolut nödvändiga.

Meningen med Ere — Parkere är att du skall läsa ordspråken (Proverboj) många gånger och repetera vid olika tillfällen så att du lär dem utantill (parkere). Därigenom blir du ett med språket. — Rolig hobby. Prova på kvällarna innan du somnar. Bonan dormon! (Givetvis måste du förstå allt innan du börjar repetera! Använd ordbok om du behöver.)

Här följer de första ordspråken, som du bör lära utantill (eller i varje fall repetera högt 8—10 gånger minst tre kvällar).

PROVERBOJ:

1. Nur lingvo uzata estas lingvo vivanta.
2. Bono farita ne estas perdita.
3. Afabla vorto pli atingas ol forto.
4. Kiu ripetas abunde, lernas funde.

Nya adresser

FÖRBUNDET

Fr. o. m. 1 oktober:

Svenska Esperantoförbundet

Fack

122 04 Stockholm-Enskede

Tel. 08 - 48 99 76

Besöksadress: Högervägen 31 (Enskede)

Tunnelbana: Tullkrogen

Exp. öppen onsdagar 18—20

REDAKTÖREN

Fr. o. m. 20 september:

Ake Blomberg, Lidåkersgatan 6 C,

531 00 LIDKÖPING

Tel. 0510 - 286 42 (arb. tid 221 30)

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Adreso: Esperantoförlaget, Fack, 200 42 Malmö 7

Ejo: Möllevångsgatan 20 B

★

Dejortempo 1 sept.—15 majo:

merkredo 10.00—11.00

jaŭde 17.00—18.00

Skribaj mendoj ekspedatataj dum la tuta jaro.

Tel. 040 / 12 20 29. Postgiro 578-5.

★

Administranto: Anna-Greta Strönné

Tel. hejma 040 / 12 92 11

Prez. Sven Sjöblom

La Espero

Svenska Esperantoförbundet

Organ för Sv. Esperantoförbundet,

Jungfrugatan 30, 114 44 Stockholm.

Postgirokonto 20 12-3.

Ansvarig utgivare: Bertl Akerberg.

Redaktör: Ake Blomberg, Lottkällsgatan 2, 531 00 Lidköping.

Tel. 0510-235 26 (arb. 0510-221 30).

Medlemsavgift för direkt medl. 25 kr, ungdom 10 kr, familjemedlem utan tidning 5 kr.

Prenumerationspris 20 kr.

Förbundets sekretariat är öppet onsdagar kl. 18—20, tel. 08-62 58 76.

Sturetryckeriet AB - Stockholm 1973

ek!

Den nya läroboken för självstudier kommer senare i höst.

Förmånspris 20:— kr. gäller ännu!